

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 24.4.2013*

## Tago de Patrino

*Zdeněk Závodný*

En mia modesta prelego mi volas honori la rolon de virinoj - patrinoj en la homara evoluo.

**Terhistorie** oni povas diri, ke en la vivularo de nia planedo la diferencigo je du seksoj okazis antaŭ pli ol 1,5 miliardoj da jaroj, kaj tio rimarkinde pliakcelis la evoluon.

**Genetike** oni povas diri, ke la patrina heredaĵo estas ĉiam pli riĉa ol la patra.

**Historie** oni povas elnombri elstarajn virinojn en ĉiuj epokoj kaj ĉiuj terenoj de la homa vivo. Tiaj estas ekzemple la faraonino Haĉepsut, la reĝino Kleopatra, la matematikistino Ipacja el Aleksandrio, la militistino Jeane d'Arc, la sciencistino María Curie - Sklodowska, la unua kosmonaŭtino Galina Tereŝkova, la ĉefministrino Margaret Tatĉer, kaj la amoplena monaĥino patrino Tereza de Kalkuto.

**Virmense** oni povas paroli pri la triobla rolo de la virino: patrino, amanto kaj edzino. Ŝi estas tiu „pli bona duono“, kiu zorgas pri la infanoj, estigas kaj gardas la harmonion de la familio. Nur la virinoj kapablas, per komuna kaj persista fortostreĉo atingi daŭran pacon kaj amikan kunlaboron inter la popoloj de la tero.

Nenie en la mondo la vivo de patrino estas facila, tamen certe en Eŭropo - en nia lando patrino spertas ankaŭ feliĉajn horojn kantante kantojn super lulilo:

Dormu mole surkusene  
kaj eklevu vin

Baj, baj dormu, plej amata  
mia infanin'  
mano tenera vin luladas,  
panjo lulas vin.

kun leviĝa sun'matene

APUD la PATRIN'

Super arbo stelnokto kuŝas,  
ĝi la turajn kufojn tuŝas

per dormiga ret'.  
Nur post domoj en la fono  
muĝas de Danubo sono,  
mia filinet'.

Sed tute aliajn zorgojn havas patrinoj ekzemple en Afriko, kie la destino de multegaj patrinoj estas la jena:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/85/50.pdf>

**Luis Serrano Pérez**

Internaciisto, p. 14, Okt./Decembro 2010

Konklude mi nur ripetos la historian veron, ke la homaro travivis sian oran epokon en tempo, kiam regis virinoj - en la periodo de MATRIARĤATO, kaj poste kiam viroj transprenis potencon, la historio de la homaro ŝanĝis sin en historion de militoj.

Virino, kiu la vivon donas, havas ankaŭ la rajton ĝin regi - kiel PATRINO, tio signifas JUSTE kaj AMPLENE. Dankon por via atento!